KONTAKTILO

MONATA INFORMILO DE
ESPERANTO SOCIETO DE PORTO ALEGRE

MONATA INFORMILO - JARO I-Nro. 04/86 - PORTO ALEGRE - CZ$2,00

JUL/AŬG/SEPT/86

SALUTOJN!

Verŝajne vi prenas ĉi-informilon kaj ekkrias: "Finfine"!

Bone... ni povus pravigi ĝian prokraston per mil malsamaj senkulpigoj. Tamen, ni opinias, ke eĉ unu senkulpigeto ne forigu de via gorĝo la ekkrion kaj ankoraŭ, tiuj miloj da argumentoj okupus tro da paĝoj (kaj ni ne havus sufiĉan vortprovizon por argumenti ĉe la venontaj eventualaj prokrastoj...).

Aliflanke, ni vidas ĝian prokraston kiel ĉarmecon: "Kio estas longe atendata estas pli ŝatata"! (almenaŭ ni esperas ke vi kontrolu viajn impetojn kontraŭ ĝi kaj ne maligu nian suban proverbon).

Sed, antaŭ ĉio (eĉ la ekkrio!) pensu ke, la redaktantoj de ĉi-ĵurnaleto estas personoj kiel vi: en ilia vivo ankaŭ okazas neatendaĵoj.

- "Tio klarigas sed ne pravigas"! vi refoje (iom oscedante) balbutos. Tamen se ankoraŭ estas tempo por duonvoje reteni aliajn ofendojn kaj por ne trouzi vian valoran tempon ni nur diras:

Jen Kontaktilo en viaj manoj!

22ª BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

La 22ª Brazila Kongreso de Esperanto malfermiĝis en la 16ª de julio je la 20:00h, ĉe la Rektorejo de la Federacia Universitato de Paranao.

Dum la solena inaŭguro, la kongresanoj estis bonvenigataj de Espedita Feitosa, prezidantino de PEA kaj respondeca pri la evento. Salutis la kongreson la reprezentantoj de la diversaj esperanto organizaĵoj de Brazilo, inter ili la sinjoroj: Teófilo Bastos Filho, Geraldo Mattos, Afonso Soares, Walter Francine, Ivan Barbosa kaj José Luiz Ferreira. Partoprenis la kongreson proksimume 500 personoj; inter tiuj, kelkaj venis el eksterlando.

Dum la kongrestagoj okazis paroladoj pri la temo: "Esperanto kaj la Sciencoj". Okazis ankaŭ debatoj pri la (jam longdaŭra diskutado) estonto de la Esperanto-movado kaj pri la centjariĝo de Esperanto; novaj metodoj por instrui Esperanton kaj (novaj aŭ ne tiel novaj) sugestoj pri maniero disvastigi Esperanton estis prezentitaj.

Sabaton la 19ªn estis libera tago, kaj ĉiuj bone sciis ĝin plenigi, ĉu per ekskurso al turismaj urboj, ĉu per vizitado de Kuritibo mem. Vespere oni amuziĝis dum la arta prezentado. Ĝin partoprenis gejunuloj de Paranao kiuj belege prezentis la tradician dancadon pri la folkloro de tiu urbo. Afonso Camboim, el Paraiba distris nin kantante kaj gitarludante.

Dimanĉe matene estis la neevitebla solena fermo, kie kun bedaŭro en la koro ĉiuj adiaŭis unu la alian promesante al si reciproke baldaŭan revidon. Post tio sekvis adiaŭa tagmanĝo, kiu permesis fini la kongreson per amikatmosfera kunfratiĝo.

KOLUMN - LUDO

Serĉu la vortojn de la kolumno ĉi flanke en la kvadrato. Ili povas troviĝi dekstre-maldekstren; maldekstre-dekstren; supre-malsupren, malsupre-supren.

Mi estas:

malseka	kritikemulo
juna	raŭka
honesta	dramema
fidinda	hontita
bonkora	entuziasma
frosta	dormema
malica	babilema
deĵora	frandema

M	B	K	S	C	F	H	K	A	T	O	N	A	B	B	H	G
E	Ĵ	R	U	B	A	B	I	L	E	M	A	T	M	I	P	D
V	N	S	C	Z	M	L	O	R	R	Ŭ	K	I	A	E	Z	T
P	H	Ĝ	Ĥ	Ĵ	E	G	I	J	V	N	M	G	L	U	B	F
S	N	Ŝ	K	A	V	E	D	J	U	N	A	I	S	O	I	J
L	B	R	R	R	J	S	R	G	O	P	L	V	E	T	O	P
M	E	D	I	O	S	A	A	C	F	E	I	Z	K	L	T	H
Ĥ	Z	C	T	K	P	M	M	Ŭ	R	G	C	R	A	E	F	M
N	U	Ĵ	I	N	Z	D	E	Ĵ	O	R	A	S	V	N	R	G
Ŝ	I	P	K	O	R	I	M	Ŭ	S	P	D	I	E	T	I	O
N	I	T	E	B	A	T	A	I	T	T	S	D	A	Ĥ	J	K
I	R	L	M	U	M	U	Z	R	A	Ŭ	K	A	T	Z	M	H
K	T	I	U	L	E	K	S	B	J	M	S	S	S	Ĝ	B	C
Ĉ	F	I	L	A	M	S	A	I	Z	U	T	N	E	K	B	T
P	S	D	O	F	R	A	N	D	E	M	A	O	N	P	R	G
B	I	A	K	R	O	A	T	I	T	N	O	H	O	L	J	S
Ĵ	U	P	F	I	D	I	N	D	A	Ŝ	P	Ĥ	H	O	T	A

Pri Amo

Malfermas mia kor'
Sin al vi en ama ardo
Kiel flor' al sunrigardo.
Ne ĉesus mia plor'
Se mi devus vin vidi
Min forlasi, min perfidi.

Kiel en spir' de vent'
Ondiĝanta spikaro
Ektremiĝas, kiel maro
Ekvibras mia sent',
Kiam via voĉo sonas,
Feliĉegon al mi donas.

Min amu same vi
Kiel vin amas mi.
Ne lasu plu min ĝemi
En sopir' kaj dolor'.
De mi ne iru for,
Lasu vin alkore premi,
Sentu min pro ravo tremi,
Mia suno, mia dio,
Mia vivo, mia ĉio.

(K. Vanselow: "Ario de Dalila)

DANA ESPERANTISTO EN PORTO ALEGRE

Nelonge vizitis nian urbon simpatia dana junulo kiu jam de 2 jaroj vojaĝas tra la mondo por disvastigi sian filozofion "Martinus Kosmologio".

KIU ESTAS LI?

Li naskiĝis en Kopenhago, Danlando, je la 7ª de novembro de 1957.

En 1974/1977, Hans Sonne li lernoservis en la Eksporta Fako de la "Orienta Aziana Kompanio", Kopenhago. Sukcesis en la komercista lerneja ekzameno de la Kompanio kaj ankaŭ la kvara nivelo kaj de la angla lingvo kaj kontado ĉe la komercista lernejo de Kopenhago.

Ĝis 1980 li estis vendisto en malgranda komerca kompanio kun vendaj distriktoj tra la tuta Danlando.

Ĝis 1984 li estis distriktestro pri industriaj konsumantoj ĉe "TEXACO", Kopenhago. En tiu sama periodo li sukcesis en la merkatado ekzameno kiel "MERKONOM" (simila al magistra grado).

En aŭgusto de 1984 komencis motorciklan mondvojaĝon, studante muzikon kaj arton (speciale la energiojn malantaŭ muziko kaj koloroj). Kiel memlerninta gitaristo kaj komponisto li prezentis danan muzikon kaj verkas artikolojn por financi la vojaĝon kiu estas planita iri Sudamerikon, Aŭstralion, Orienton kaj Ĉinion ĝis 1988. Dum la vojaĝo, li komencis studi E-on.

Krom la dek jaroj de komerca sperto, dum cep jaroj li studis malsamajn religiojn, filozofiojn, spiritajn fenomenojn kaj krome psikologion kaj parafenomenojn. Tiuj studojn gvidis lin al Martinus Kosmologio. Dum la duonjaro antaŭ ol li forlasis Danlando, li ege kontribuis al la produktado/redaktado de la Revuo "KOSMOS" (en la Dana, Sveda, Germana kaj Angla lingvoj) kaj kontaktiĝis kun ĉiuj kiuj laboris kaj loĝis kun Martinus ĝis lia morto en 1981. Li volontulas por la Martinus Kosmologio kaj li penas trovi Nordamerikan Eldonejon por la ĉefa verko de Martinus "La Tria Testamento". Li kunlaboras kun sia amiko, Ole Therkelsen, kiu studis la Martinus Kosmologion dum pli ol dek kvin jaroj kaj kiu veturis tra USONO dum tri monatoj en aŭtuno 1984 kie li prelegis pri Martinus Kosmologio.

ENKONDUKO AL MARTINUS KOSMOLOGIO

De Hans Sonne, Danlando

La "Mondbildo" per kiu homoj vivas hodiaŭ estas bazita je materialisma vidpunkto. Bedaŭrinde ni devas konstati, ke ni nun frontas la plej gravajn problemojn iam alfrontitajn dum la historio de la homaro: La ebleco de mondaj konfliktoj kiuj povas komenci trian mond-militon, la malpurigado de nia terglobo kaj la fakto de pli da homoj nun malsatas ol iam antaŭe. Eble nun estas la tempo por la enkonduko de nova mondbildo, unu per kiu la mondo povos esti ŝanĝota!

LA VERDA KAFO ESTAS ĈIU LASTA SABATO MATENE EN LA RESTORACIO BOLONHESA ĈE STRATO: ANDRADE NEVES, 97 JE LA 16 h.

PARTOPRENU!

LA PROBLEMO (?) PRI DISDIALEKTIĜO

"Miaj pripensoj povus ŝajni iom negativaj: geografia variado de Esperanto estas nekontestebla kaj neevitebla; ĉu tio do signifas, ke la fifama "disdialektiĝo", kiun tiel timas la esperantistoj, estas fatala? Al tio mi respondu: jes, sed tio tute ne gravas! "Disdialektiĝo" ne signifas "dislingviĝo", ĉar la karakterizo de plurdialekta lingvo (tio estas pleonasmo, ĉar ĉiu lingvo estas plurdialekta, ne ekzistas ideale homogena lingvo) estas la ebleco de interdialekta interkompreniĝo." "La problemo de interdialekta interkompreniĝo en Esperanto" ĝuste estas la temo de mia verkota doktoriga disertacio, do mi povos prezenti kompletan studon nur post kelkaj jaroj. Sed intuicie ni jam povas diri: interkompreniĝo inter malsamdevenaj esperantistoj ja ĝenerale eblas (kelkfoje post iom da alkutimiĝo, sed tio okazas ankaŭ en etnaj lingvoj), Esperanto efektive funkcias en interetna komunikado. Sed kiel certiĝi, ke tiu interkompreniĝo plu daŭros post cent aŭ ducent jaroj? Tio ja ne dependas de ni, nek de iu ajn akademio, fundamento aŭ alispeca aŭtoritato: se internacia komunikado pere de Esperanto restos sub iu certa nivelo, tio estas, se Esperanto ne respondos al iu vera bezono, nu, tiam certe estas neniu kialo, por ke la lingvo restu homogena kaj certigu facilan interkompreniĝon. Se, male, Esperanto estos intense uzata en interetnaj informfluoj, tiam la dialektaj diferencoj aŭtomate restos ĉe akceptebla nivelo".

(Alain Dawson, en sia artikolo "Ni bezonas dialektologion de Esperanto" al la revuo "Esperanto" 3/1983)



Floro kaj Papilio

Tiu strato havas domon kaj ĝardenon,
Kie loĝas la plej bonodora flor';
Tiu flor' en mian koron metis ĉenon,
Kaj ne plu mi sukcesos flugi for.

Kvamkam vi bone flugas, papilio,
Mi ne lasos, ke vi reflugu for,
Ĉar mi vidis vin kaj amis vin pro tio,
Ke vi estas por mi fluganta flor'.

KELKAJ DIFINOJ:

Bonfaranto - estas tiu, kiu helpas kaj pasas.

Amiko - estas tiu, kiu subtenas silente.

Kamarado - estas tiu, kiu kunlaboras sen embarasi.

Renoviganto - estas tiu, kiu sin renovigas por la bono.

Fortulo - estas tiu, kiu scias atendi en la paca laboro.

Kunulo - estas tiu, kiu sin konas.

Kuraĝemulo - estas tiu, kiu nenion temas je si mem.

Efikeculo - estas tiu, kiu agas je ĉies profito.

Venkanto - estas kiu venkas sin mem.

Defendanto - estas tiu, kiu kunagas sen ĝeni.

SEN VORTOJ



K O N T A K T I L O

ESPA-Informilo

JUL/AŬG/SEPT/ 86

Korespondadreso:

Rua dos Andradas, 1137/ 1704

Tel. :25.3941 - Centro

Porto Alegre - RS

CEP 90.000

PRI LA KONKURSO

Bedaŭrinde neniu venkis la divenkonkurson de junio. Oni ricevis kelkajn leterojn sed ili ne trafis. Multaj erare opiniis ke tiu "juvelo" estis Marilin Monroe (eble pro la survizaĝa makuleto) aŭ la princino Diana.

Do, por satigi vian scivolemon, oni komunikas, ke tiu bela knabineto kiu vi vidis sur la portreto ĝuante sian infanecon estis neniu pli ol nia estimata amikino Zélia C. da Silva, instruantino de Esperanto ĉe S.E. "Allan Kardec" Malfacile?ne.Atentu.